

1.a DIMANĈO DE ADVENTO 27-a de novembro 2016

VIGLU KAJ ESTU PRETAJ POR LIA ALVENO

El la evangelio laŭ Mateo 24, 37-44

Komento al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

En tiu tempo Jesuo diris al siaj disĉiploj: „Kiel okazis en la tempo de Noa, tiel estos ĉe la veno de la Filo de la homo. Ĉar antaŭ la diluvo oni manĝis kaj trinkis, edziĝis kaj edziniĝis, ĝis Noa eniris en la arkeon. Neniu suspektis ion, ĝis la diluvo venis kaj forprenis ĉiujn. Tiel ankaŭ estos ĉe la veno de la Filo de la homo. Tiam se du viroj estos sur kampo, unu estos forprenata kaj la alia lasata. Se du virinoj estos laborantaj ĉe muelilo, unu estos forprenata kaj la alia lasata.

Do viglu: ĉar vi ne scias, en kiu tago via Sinjoro venos. Sed tutcerte, se la domomastro scius en kiu noktoparto venos la ŝtelisto, li viglus kaj ne lasus sian pordon disbati. Tial ankaŭ vi estu pretaj, ĉar la Filo de la homo venas kiam vi ne atendos.”

La liturgio de la unua dimanĉo de Advento prezentas al ni eron ne facile legeblan, kaj por ĝin kompreni oni devas enmeti ĝin en ĝian kuntekston, kiu estas la ĉapitro 24, la komenco de la lasta parolado de Jesuo, antaŭ ol li estos arestita.

Ĉi tiu ĉapitro 24 komenciĝis kun Jesuo, kiu eliris el la templo kaj, antaŭ la disĉiploj kiuj admiris ĝian brilegon, diras: "*Ĉio, kion vi nun vidas, estos detruita. Ne restos ĉi tie ŝtono sur ŝtono.*"

Kial ĉi tio?

Pli frue, estis la epizodo de la oferdono de la vidvino, kiu elĉerpiĝis por oferi sian tutan havon al la trezoro de la templo.

Nu por Jesuo, iu religia institucio kiu, anstataŭ helpi la malfortulojn, sin lasas vivteni de la malfortuloj kaj ekspluatas la malfortulojn en la nomo de Dio, ne havas rajton ekzisti.

Tial Jesuo deklaras la finon de ĉi ĉio: jen, *ĉio estos detruita, ne restos ĉi tie ŝtono sur ŝtono.*

Sed ĉi tio estas nur la komenco de renversiĝo, de ŝanĝiĝo kiu okazos en la historio kaj en la homaro. Kaj Jesuo daŭrigas asertante, per la utiligo de la profeteca lingvaĵo, ke la suno ne plu donos sian brilegon. La suno en tiu kulturo reprezentis la paganajn diaĵojn.

Jesuo, en ĉi tiu agado de ŝanĝo de la homaro, petas la kunlaboron de siaj disĉiploj.

La anonco de la evangelio de la vera Dio alportos la eklipson de la malveraj diaĵoj kaj, diras Jesuo, la astroj komencos fali.

Kiuj estas tiuj astroj?

La astroj estis bildoj de la reĝoj, de la potenculoj, de la imperiestroj, kiuj sur tiuj diaĵoj bazis sian povon. Kiam la anonco de la evangelio senlumigas ĉi tiujn diaĵojn, jen tiuj reĝoj, tiuj princoj unu post la alia falas. Do ĝi estas la komenco de ŝanĝiĝo de la homaro kaj, diras Jesuo, tiel vi vidos en la ĉielo la signon de la filo de la homo.

Kio estas ĉi tiu filo de la homo?

Ĝi estas la titolo kiu plej ofte aperas en la evangelioj, kune kun filo de Dio, kaj ĝi estas ĉian edirata de Jesuo.

La esprimo estas ĉerpita el la libro de profeto Danielo, en la sepa ĉapitro, kie la profeto, en sonĝo, vidas ekstarti el la maro, la Mediteranea maro, kvar bestoj. La bestoj estas bildo de la politikaj povoj, konataj pro sovaĝeco, unu pli kruda ol la alia. La unua besto reprezentas la Babilonan imperion, poste tiun de Medoj, de Persoj. La kvara estas tiel abomeninda ke la profeto eĉ ne scias kiel priskribi ĝin, kaj ĝi reprezentas Aleksandron la Grandan.

Nu, Dio detruos ĉi tiujn malhomajn politikajn povojn, kaj donos sian povon al iu filo de la homo, esprimo kiu signifas *homo*. Nome, la agado de Dio en la homaro estas la forigo de ĉio malhoma, por triumfigi la homan.

Do, kiam Jesuo parolas pri si kiel filo de la homo, kion tio signifas?

Jesuo estas la filo de Dio tial ke li reprezentas, manifestas Dion en sia homa kondiĉo, sed li estas la filo de la homo, tial ke li reprezentas la homon en sia dia kondiĉo. Kaj ĉi tiu dia kondiĉo ne estas ekskluziva privilegio de Jesuo, sed propono al ĉiuj kiuj akceptas lin kaj volas lin sekvi.

En la anoncoj de la pasiono, Jesuo diras ke la tuta malamo, la rankoro, la sovaĝo de la religia institucio ne estos kontraŭ la Kristo, nome la Mesio, ĉar la Mesio estas unu, kaj post lia elimino la institucio povas ripozi trankvile. Sed ili estos kontraŭ la filo de la homo, kiu ja estas danĝera, ĉar ne temos nur pri Jesuo, sed pri ĉiuj kiuj sekvas lin. Ni memoru, ke la aresta ordono ne estis nur por Jesuo, sed por ĉiuj liaj disĉiploj. Estas danĝera la doktrino.

Tial Jesuo, kiam li anoncas la pasionon, diras ke la filo de la homo estos kondamnita, mortigita, sed poste releviĝos.

Ĉi tiu propono de dia kondiĉo ne estas privilegio de Jesuo, sed ĝi estas proponata al ĉiuj liaj sekvantoj. Tamen, diras Jesuo, oni devas atenti, kaj jen la rilatigo al al la tagoj de Noa.

Kion diras Jesuo? "*Antaŭ la diluvo oni manĝis kaj trinkis*", ĉiuj normalaj faroj. Sed oni devas atenti ke tiu propono de vivpleneco ne estu distrita de la ĉiutaga rutino. La okazaĵo de la diluvo ne estis la fino de la mondo, sed la komenco de nova homaro.

Kaj por ke ĉi tiu nova homaro komenciĝu, Jesuo bezonas kunlaboron.

La gvidlinio de Jesuo, kiu estas la filo de la homo, nome la persono plene homa, tute homa, estas la humanigo de la socio.

La povoj, ĉio kio superregas, estas malhomaj, tiam la agado de Jesuo estas la humanigo de ĉi tiu homaro. Sed tio, samkiel por li, ne estos sendolora.

Jen kial Jesuo admonas siajn disĉiplojn: viglu, maldormu. Ĝi estas la sama invito kiun li donos en la momento de la angoro de Getsemano al siaj disĉiploj, ĉar estas klare ke la povoj ne restos senmovaj kiam ili vidos ke ilia sistemo estas erodata, kaj do ili senbridiĝos sovaĝe, estos la persekuto samkiel por Jesuo.

Sed Jesuo tion certigis: inter persekutatoj kaj persekutantoj, Dio ĉiam metas sin je la flanko de la persekutatoj.

Kaj la evangeliisto enfermas en ĉi tiun instruon tion, kion li estis anoncinta per la feliĉpromesoj: tiuj kiuj elektas kunlabori kun Jesuo je la regno de Dio, eĉ se senbridiĝas la persekuto, nu ĝi estos feliĉo, kiu konfirmos ke Dio estas je ilia flanko.